prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org/
septembro - oktobro 2011, n-ro 9 -10 ( 1275 - 1276 )

# Sennaciulo

## Nia dosiero -
## Nuklea energio jes!- nuklea energio ne?




SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA
SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!

# DEKLARACIO KAJ GVIDREZOLUCIO 2011

## Deklaracio

La 84-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Sarajevo de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011, substrekas, ke ĝia statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi-jare, la kongresa temo estis "Tutmondiĝo kaj naciaj fenomenoj".

## La Kongreso

subtenas, akorde kun la agaddirekto de la sarajevaj esperantistoj, la proponon, ke la Eŭropa Konsilio proklamu Sarajevon, severe agresitan dum la bosnia milito kaj tamen plu sukcese multkulturan, eŭropa metropolo de kulturo en unu el la venontaj jaroj,

kondolencas pro la korŝiraj okazintaĵoj de Oslo, Norvegio, kaj atentas pri la teruraj sekvoj de ĉia terorismo,

skribis al la Ambasadoroj de Ĉinio, Pakistano, Rusio, Usono en Bosnio-kaj-Hercegovino por postuli ke la registaro de tiuj landoj subskribu kaj ratifu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn, kaj la Konvencion de Oslo, kiu malpermesas iujn pafaĵoĵetojn el bomboj,

skribis al prezidanto de Eŭropa Komisiono por peti, ke li intervenu ĉe sia oficistaro por esplori la eblecon pligrandigi la monhelpon al Bosnio-kaj-Hercegovino por ke ĝi povu atingi la tutan senminigon de sia teritorio en 2019,

konstatas ke pligraviĝas la malfacilaĵoj kiuj rezultas de naciismo kaj kapitalismo interalie ekologiaj, vivkondiĉaj kaj ekonomiaj kiujn regule frontas homoj,

konstatas ke la homoj kiuj devas pro tiaj kaŭzoj suferi la sekvon de la rabado de sia lando aŭ de milito fariĝas nenie dezirataj migrantoj, konstatas danĝeron de la kresko de gasoj kiuj elvokas tutplanedan varmiĝon,

konstatas ke la politikaj kaj financaj fortoj ne sufiĉe atentas la malbonajn konsekvencojn de la ekologiaj damaĝoj,

atentigas pri danĝero de pritrakto de nukleenergio, kiu okazigas katastrofojn tuŝantajn la tutan mondon kiel antaŭ 25 jaroj en Ĉernobilo kaj ĉi-jare en Fukuŝimo,

kontraŭas la iniciaton de registaroj bari la vojon al sociaj luktoj per subpremo de aktivuloj kiel interalie la serba registaro, kiu rekomencas sian senbazan proceson kontraŭ anarĥiistoj en Beogrado kun la celo apartigi ilin de la laborista klaso.

## Gvidrezolucio

La 84-a Kongreso de SAT kunvenanta en Sarajevo inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 2011,

instigas la SAT-anojn raporti pri okazaĵoj en sia regiono kiel faris SAT-ano el Japanio pri la katastrofo en Fukuŝimo,

plu instigas la membrojn al jarkomenca pago de la kotizo kaj al plej efika varbado de novaj membroj,

invitas la Plenum-Komitaton organizi malfermitan konkurson por krei novajn varbilojn kiuj plej taŭge prezentu SAT kaj ĝiajn celojn,

instigas ĉiujn SAT-anojn organizi SAT-kunvenojn dum ĉiuj landaj, regionaj aŭ fakaj kongresoj en kiuj ili partoprenos,

instigas ellabori tekston por respondi en la retejo al la plej oftaj demandoj pri kio estas SAT, ĝiaj celoj kaj agadoj,

bonvenigas la proponon krei artan fakon por efikigi la jam komencitan laboron de nunaj muzikistaj kaj artemaj SAT-anoj,

refoje konstatas la efikan laboron de la Eldona Fako Kooperativa notinde pri la nun preskaŭ preta dokumentfilmo titolita Esperanto, plu instigas SAT-anojn mem partopreni en ĝia vivigo. Ĉiu SAT-rondo klopodu organizi minimume unu publikan projekciadon de la filmo, kaj laŭeble helpu la projekton per antaŭmendoj ĝis ĝia definitiva apero DVD-forme (esperelble jarfine),

proponas ke ĉiujare parto de la profito de SAT estu dediĉota al eldonoj per aparta kontero « Eldona Fonduso », provizore per EFK,

invitas ĉiujn kamaradojn pli kontribui al Sennaciulo kaj al Sennacieca Revuo,

plu instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo,

invitas la Plenum-Komitaton daŭrigi kunlaboron kun IFEF,

petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso la materialaj kongreskondiĉoj estu SAT-ecaj kaj la turismaĵoj klerigaj.

# ENHAVO


2--Deklaracio kaj Gvidrezolucio 2011

4--Atomcentraloj

5--La nuklea energio, sub publika regado, estas ĉi tie nepreterirebla.

6--Ne al atom-energio

8--Atomindustrio kaj politiko

10--Ĉu la estonteco de la atomindustrio?

12--Nukleo-energiaj centraloj en Svisio

14--Pacdeklaro de Nagasako, 2011

15--Atentigo

16--Esperanto funkciis en kontraŭatoma agado

17--Evoluo

18--La 84-a SAT-Kongreso en Bosniaj amaskomunikiloj

20--Resumo pri la Kongresaj laborkunsidoj

23--Pacista Frakcio de SAT

27--Ideologio kaj movado

31--La movado 15-M (privata opinio)

34--OSLO

37--Oni povas revi

37--Ĉu SAT kapablas denove kreski?

39--Denove kaj ree pri statutŝanĝo

40--Amnestio Internacia kaj Lingva Imperiismo

41--Kiu povas savi libion el ties okcidentaj savantoj? Ne la franca maldekstremularo.

43--Liberecana Frakcio

44--Malsukceso de la nutraĵa sistemo

46--Kion precize signifas spekulado?

47--La Balado de homoj fieraj pro sia deveno

47--(La Ballade des gens qui sont nés quelque part)

48--Skize pri la historio de IFEF. kaj ties rilatoj kun SAT. *

50--Nicephore Niepce (nisefor' nieps')

52--Ni legis por vi...

54--Kelkaj konsiloj por faciligi SAT kontadon.

54--Novaliĝoj

55--Mortintoj

55--Kroniko



# Sennaciulo
## Oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1 47 97 71 90
Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.;
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : satx-s
Plenum-Komitato de SAT :
Prezidanto : Jakvo Schram
Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo
Kasistino : Franjo Leveque-Provost
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent,Thérèse Sabatier

Redaktantoj - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, David Kelso, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, Ed Robertson, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale. ĉefredakto Jakvo.
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T..
Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier;
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567


## SAT-KONGRESO JALTO

## 11 - 18 - 08 - 2012



# ATOMCENTRALOJ

Kiam mi estis juna, mi fidis ĉiujn sciencaĵojn. Tiuj temoj klarigitaj pere de racio laŭ mi kontaŭbatalas religion kiu premas individuojn per truditaj kredoj. Nun mi mildigas mian aserton. Tamen, fakte, scienculoj, scientistoj ĉiam diras: ni faras hipotezojn, poste ni kontrolas paŝon post paŝo. Ni antaŭeniras.

Mirindaj, efikaj malkovroj aperis, radioaktiveco estas unu el ĝi. Kiel diras la proverbo "ne metu ĉiujn ovojn en saman korbon". Ni devas disvolvi ĉiujn fontojn de elektro-produktado: ventumiloj, sunpaneloj, uzo de varma akvo de la subteraj riveroj, ktp. ktp.

Mi legas multe pri ŝparado de elektro-uzo, kompreneble, sed je kia grado? Ĉu ĉiuj povas nur bicikli au piediri? Multaj agadoj ne estas farindaj per nur biciklado – mi memoras pri mia juneco.

La problemo estas varmigo de la tero. Do... Jes, ni povas postuli de firmaoj konstruadon de ŝparemaj aparatoj. Fervojo uzas elektron: ĉiuj mezuroj montras ke ĝi estas la plej bona transportorimedo por la planedo. Ne forgesu ke novaj potencolandoj vekiĝas, Hindujo, Sudameriko kaj cefe Ĉinio.



La sciencisto Georges Ĉarpak skribis: "kiam landoj atingos nian altnivelon de evoluo, kiom da kvanto da karbon-dioksido el bruligita ligno aŭ karbo tute venena al nia tero estos produktita se ili uzas nur 'tradiciajn' fontojn de elektro?". Li kuraĝigas al pli da studado pri atomcentraloj por pli kaj pli, paŝon post paŝon, regi, sekurigi tiun energion.

Kompreneble, ĉie en la mondo, 100% da sekureco ne estas ebla. Ĉiuj avantaĝoj – vojaĝoj per aviadilo, aŭtomobiloj – altigas eblecon de akcidentoj. Kaze de radioaktiveco, kompreneble sekvoj daŭras jarcentojn, kelkfoje jarmilojn laŭ la metaloj uzitaj (plutonio, diversaj uranioj, ktp). Ni devu studi, cerbumi por konservi sekurece tiujn elementojn.

Mi vetas, ke preskaŭ ĉiujn akcidentojn HOMO (SAPIENS) povas eviti, kondiĉe ke li zorgu pri kontrolado, flegado kaj sekurigo. Firmaoj en nia kapitalista mondo nur serĉas profiton.

Jen parto de konstato farita de Eric Ouzounian aperinta en la revuo "Fenestro vide al kursoj" de la



Sindikata Unuigita Federacio (Federation Syndicale Unitaire): Nomadoj proksimume estas 3000, kiuj veturas de atomcentralo al atomcentralo, kiuj laboras pri 58 reaktoroj en 19 francaj atomcentraloj, ĉefe estritaj de 2 entreprenoj Suez kaj Areva, subkontraktantaj firmaoj por la ĝenerala registara firmao Elekto de Francio (EDF). Ili faras 80% el riparado, zorgado pri bona funkciado. La laboristoj de tiuj entreprenoj ricevas nur iomete pli da radiadoj ol normalaj laboristoj sed ofte samtempe ili estas eksponataj al multaj aliaj radiadoj, kaj ofte al asbesto, laŭ studado de INSERM (Instituto pri Sano). "La konkurado al pli da profito kreas situaciojn neregeblaj; kiam tro da laboro estas atendita, sekureco estas malzorgita. Pro tiu situacio povus okazi iun tagon incidento ekster la konstruaĵo kie kuŝas la reaktoro."

Mi atentigas vin pri konstato farita de sociologoj. Kiam okazas katastrofoj, ĉiam ŝtatoj, firmaoj, fortaj asocioj kaptas okazon de la eventoj por akceptigi leĝojn, regulojn drastajn; ekzemple Usono post la 11an de septembro faris kruc-militon kontraŭ terorismo. Nun, post katastrofo de Fukuŝimo en Japanio ne fidu la proponojn de iu ajn; cerbumu..

Ĉu eblas ambaŭ diversaj elektrofontoj? eĉ de atomcentraloj? Cu mi sonĝas? Ne, mi vetas!

**Jocelyne Monneret**